

Literatura Mondo, 1-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 460, 1972.08.02 & 05

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Antaŭ kvindek jaroj, tio estas en 1922, naskiĝis la revuo *Literatura Mondo*. Tiu belaspekta monata organo, malgraŭ sia krizema vivo, plenumis ege gravan rolon en la disvolviĝo de esperanto kaj de ties literaturo.

A.- Fondis tiun revuon *Literatura Mondo* hungara advokato nomata Tivadar aŭ Teodoro Schwartz. Tiu talenta redaktoro havis neordinaran kapablon malkovri aliajn talentojn. Tuj li sin ĉirkaŭis de agemaj junaj verkistoj aŭ verkemuloj, kies nomoj hodiaŭ estas famaj : Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Raymond Schwartz.

Cl.- Teodoro Schwartz ne havis facilan vivon. En 1922 li ĵus travivis militkaptitecon en Siberio. Aperis folietone en *Literatura Mondo* liaj aventuroj sub la titolo *Modernaj Robinzonoj*. Tiu senpretenda kaj humurplena raporto pri lia fuĝado kun aliaj militkaptitoj tra la siberia arbaro vipis la intereson por la revuo *Literatura Mondo* en ties dua jaro. Ankoraŭ nun oni legas ĝin kun granda intereso. Same kiel raportisto li senpretende kaj ankaŭ humure rakontas pri la tragika sorto, kiu lin ligis al la persekutataj judoj dum la dua mondmilito. Tiun memorlibron eldonis Stafeto sub la titolo *Maskerado ĉirkaŭ la morto*, tio en 1965. Ĝi estas ankoraŭ aĉetebla.

A.- Teodoro Schwartz estas unu el tiuj heroaj personecoj, kiuj permesis al la miraklo de esperanto plu daŭri. Dum du jaroj li malavare dediĉis ĉiujn siajn fortojn al la eldonado de *Literatura Mondo*, ŝparante nek monon, nek la sanon. Fine en septembro 1924 li havis la ĝojon povi transdoni la dujaran revuon al Hungara Esperanto-Instituto. Li ne seninteresiĝis pri la plua evoluo de la afero. Lian nomon oni trovas inter la plej malavaraj donacantoj kaj li restis aktiva kunlaboranto de la nova redaktora grupo.

Cl.- Kio ligis Teodoron Schwartz al liaj kunlaborantoj, tio estis komuna kredo je la absoluta neceso disflorigi la esperanto-literaturon.

A.- Tiun kredon bone resumas kelkaj versoj, kiujn ni ĉerpas el raporto, kiu aperis en aŭgusto 1923 kun la ĝenerala subskribo : *Samideane : La redakta komitato*. Jen tiuj versoj :

Cl.- « *En la literaturo la lingvo vivas, spiras,
El ĝi la freŝon, riĉon, potencon ĝi akiras.
Ne nur ornam' ĝi estas, ĝi estas garantio
De nepereigebla vivanta energio.* »

A.- Teodoro Schwartz kaj liaj kunlaborantoj volis « *montri al la mondo, ke la Esperantismo demetis siajn infanĝuojn !* » Ili entuziasme plenumis la promesitan laboron. Ili tradukis kaj verkis originale. Ili analizis la novajn librojn en kritikaj recenzoj. Ili malfermis debatojn, kiuj kelkfoje iris ĝis disputoj. Kaj malgraŭ la financaj malfacilaĵoj ili provis garantii al la revuo altan nivelon, regulan aperadon kaj varian materialon.

Cl.- De oktobro 1922 ĝis septembro 1924 *Literatura Mondo* dependis de sia mecenato Teodoro Schwartz. Kiam la monujo de tiu malavara esperantisto estis malplena, la kunverkantoj de *Literatura Mondo* rifuzis sin klini antaŭ la malagrabla ekonomia realeco. Tuj

formiĝis Esperantista Literatura Asocio, kies celo estis provi garantii la pluan eldonadon de la revuo. Oni eĉ povas diri, ke tiu unua krizo de 1924 kuncementis la verkantojn kaj legantojn de *Literatura Mondo*. Okazis nenia interrompo en la eldonado. Nur la septembra numero estis aperigita kun la oktobra sub formo de duobla numero.

A.- Esperantista Literatura Asocio dependis de Hungara Esperanto-Instituto, kaj la nova ĉefredaktoro de *Literatura Mondo* estis la hungara polickapitano nomata Vince Tóth. Kiel lia antaŭulo Teodoro Schwartz li kapablis sin ĉirkaŭi de talentaj helpantoj. Bedaŭrinde jam en aprilo 1926 okazis la dua krizo. La financaj malfacilaĵoj superis la komunan bonvolon. La nombro de la abonantoj ne sufiĉis por eviti deficitajn, kaj prezaltiĝoj en la presado kondukis al senesperiga situacio.

Cl.- La malapero de tiu unika revuo estis sentata en tuta Esperantio kiel grava regreso. Ankaŭ ĝi montris, ke ĉirkaŭ *Literatura Mondo* estis naskiĝinta literatura skolo, tio estas grupo da verkistoj, kiuj sentis sin ligitaj de komuna sorto, kiuj havis komunajn esperojn kaj kredojn, inter ili, ke artefarita lingvo kiel esperanto nur venkos, se ĝi kapablos naski literaturon, kiu personigas la sopirojn proprajn al la nuna mondo : emo al unueco, tutmondeco, interpopola kunlaboro, arto.

A.- La anoj de tiu literatura skolo kaj iliaj admirantoj havis nur unu komunan deziron : revivigi la revuon *Literatura Mondo* por ree havi rimedon kune labori al la disvolvo de la esperanta kulturo.

Cl.- Estas tria hungaro nomata Vilmos Bleier, foira komercisto kaj seruristo, kiu malavare reaperigis la revuon *Literatura Mondo* ekde januaro 1931. Vilmos Bleier estas unu el tiuj neordinaraj apostoloj de esperanto, kiuj kapablis vivi du vivojn : la profesion kaj la esperantan. Talenta oratoro, li organizadis literaturajn vesperojn en multaj kongresoj en la celo kuraĝigi la esperanto-verkistojn kaj varbi novajn abonantojn al *Literatura Mondo*. Krom tio li laboris al la redaktado de la *Enciklopedio de Esperanto*. Tiu fama duvoluma vortaro alportas utilajn sciigojn pri nia movado ĝis la jaro 1933. Same kiel la renaskiĝinta revuo *Literatura Mondo* ĝi eternigis la memoron de tiu eksterordinara esperantisto.

A.- Sub la redaktado de Vilmos Bleier *Literatura Mondo* fariĝis vere tre altnivela revuo. Dum la krizaj jaroj maturiĝis la talentoj, kaj ekde 1931 abundis la originalaĵoj, kiuj atestas pri firmiĝintaj personecoj.

Cl.- La Dua Mondmilito mortigis kaj la revuon kaj la skolon *Literatura Mondo* kaj ĝis nun neniu organo venis redoni forumojn kaj komunan celon al niaj verkistoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!